

**FLANDRA  
ESPERANTISTO**



**MONATAJ REVUO**

**ORGANO DE LA FLANDRA  
ESPERANTO  
MOVADO**

**ENHAVO :**

Karel van de Woestyne. — Orfeo. — La Flandroj  
 ĉe la Internacia Blindulkongreso en Vieno. — La  
 Tremvostulo. — Nekrologio. — Sub la libera ĉielo.  
 — Francemaj U. E. A. deligitoj en Flandrujo. — Al  
 la Flandra Socia Memregeco. — Pri la fraŭlino, kiu  
 preĝis al la Sankta Virgulino por akiri edzon. —  
 Majstro. — Ĝi ridis. — Diversaĵoj. — Subteno por  
 nia revuo. — Gratuloj. — Bibliografio. — Inter ni. —  
 Esperanto door Zelfdonderricht. 3<sup>de</sup> Les. — Faŝista  
 Militemo.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

# FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geysterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

## Karel VAN DE WOESTYNE

La 24 an. de Aŭgusto mortis la poeto Karel van de Woestyne en Zwijnaarde apud Gento. Estas grava perdo por la tuta nederlanda lingvoteritorio, ĉar van de Woestyne estis granda flandro, ne nur la gloro de la nederlanda literaturo, sed unu el la plej altstarantaj eŭropaj poetoj. Kaj tia li estus certe honorata, se la lingvo en kiu li verkis estus pli disvastigita kaj konata.

La granda rolo de Esperanto estu konigi al la mondo tiajn figurojn pri kiuj la lingvoj plidisvastigitaj tro memkontente malatentas.

Karel van de Woestyne estis la plej signifa vivanta poeto de Flandrujo, la egalo de Guido Gezelle (1830-1899) kies arto tamen spruĉas el la freŝa fonto de la popolanimo kaj popollingvo.

Van de Woestyne kontraŭe, influita de la francaj simbolistoj, estas preskaŭ la sola flandra verkisto, kiu staras super kaj ekster la popolo. Per li la flandro trarompis la rasajn tradiciojn kaj orientiĝis al eŭropa, kosmopolita koncepto. Kun li la flandra literaturo ĉesis esti nure regiona. Li estis pioniro por nova, soberena flandra kulturo, same kiel August Vermeylen, kiu diris pri li, ke li „estas la poeto de la moderna animstato en ĝia plej ekstrema disvolviĝo. Kompleta homa naturo parolas el lia verko: seuscio, sento, fantazio, penso, ĉiu elemento en siaj plej diversaj statoj kaj ĉiu en riĉa vario. Kvankam staranta super la popolo, de flandra esenco ĉiam restas lia amo por la karneco de la koloro; la varmo de l' sango sin ĉiam sentigas, kie la animo sin plej pure rivelas.”

La arto de van de Woestyne estas forte individua kaj subtilega, ja, ofte klasika kun propra ritmo. Ĉu poezia, ĉu proza ĝi estas saturita

de profundaj pensoj kaj peza je bildoj, dolĉa kaj potenca kun mezepoka simpleco aŭ renesanca abundo.

Liaj versoj larĝaj kaj klare epopeaj ŝajnas kelkfoje malprecizaj kaj nekompreneblaj, precipe pro la lingvo ofte konfuza kaj tordita. Tial van de Woestyne neniam estos, kion oni nomas „populara.” Malluma tamen neniam estas lia verso, eble malluma nur por tiuj al kiuj mankas la imagsentemo, al tiuj kiuj ne kapablas mordi la juglandon por trovi la bongustan kernon. La videbleco en la versoj de van de Woestyne nur estas rimedo, esenco estas la dramo de la interna vivo de l'homo, kaj tial ankaŭ lia verko apartenas al la plej spirita, kion ni posedas en nia lingvo.



„Van de Woestyne,” skribis la holanda ĵurnalo *La Telegrafo*, okaze de lia morto, „estis kiel lia samurbano Maeterlinck varmejfloro, kulturplanto valorega. Per ĝermana forteco li esprimas tre latinan sintenon rilate al la vivo. Li estis la renesanchomo, sed en siaj plej intimaj horoj li estis sentanta jam la ekscitan malkvieton de la Baroko. En li vibris ankoraŭ ĉiuj potencaj pasikrioj de la Gotiko, sed per amaj manoj li ĉirkaŭpremis la novesploritan mondon. Kiam li sentis la teron, tiam



lia parolo sonis peze kaj belege sentame, sed kiam denove suferado lin ektiris supren, tiam — senigita de ĉia artefarito — lia voĉo estis rauka kaj alta sed tiu de profunde vivanta homo. Li sin tenis — rafinita estetikulo — ekster la reala flandra batalo kaj nur multe pli malfrue kelkaj venis al li, kiam oni estis ekrovinta la vojon.”

Fakte la pli juna flandra poezio, krom de Guido Gezelle, estis ĉefe regata de Karel van de Woestyne. Lia influo el poezia kaj ideologia vidpunkto estis grava sur la postajn, antaŭmilitajn generaciojn.

TYNEVERUM.

BIOGRAFIO. — Karel van de Woestyne naskiĝis en Gento en 1878. Li estis profesoro ĉe la Genta universitato kaj membro de la Flandra Akademio. Liaj ĉefaj prozoverkoj estas: *Laethem-aj Leteroj*, *Leteroj pri la Printempo*, *La flandraj Printempoj*, *Janius kun la duobla Frunto*, *La Konstanta Ĉesto*, *Diaj Imagoj*, k.c. El liaj versaĵaroj ni citas: *La Patrodomo*, *La ora Ombro*, *Interludoj*, *La Arbejo de l'Birdoj kaj de l'Fruktoj*, *Substrata*, *Suno en la Dorso*, k.c.

## ORFEO.

DE KAREL VAN DE WOESTYNE

*(La greka kantisto Orfeo estis perdinta sian amalinon Eŭrudiko, mordita de l'serpento de la ĵaluzulo Aristajoso. Sed li tiel bele kaj profunde estis kantinta sian doloron, ke li ricevis la permeson revenigi ŝin el la mortejo al la vivo, kondiĉe ke li ne postrigardu al ŝi.)*

Amikoj miaj! — kaj ni iris. Ŝi  
timeme sekvis min kiel infan'.  
Tra val' ni iris, nuda ŝtonegar';  
ĉe nia flank' senmova rivereg'  
simila al ekfandiĝinta plumb',  
kaj tuta la ĉiel' nur estis plumb'.  
Mi ne parolis vorton: kun obstin'  
antaŭen iris rekt' al mia ĝoj'.  
Kaj ŝi, ŝi sekvis min. En dolĉa bru'  
moviĝis ŝia vest', dum ekmoviĝ'  
aromis ĝi. Kaj ne parolis mi,  
turnata la vizaĝ' al mia ĝoj',  
eĉ unu vorton. Ŝi parolis nur  
por eta krio: „Ho, Orfe'!” mi tuj  
malmolan ŝtonon ekdivenis sub

piedoj ŝiaj; aŭ por bela rid':  
„Orfeo mia!”, pro soleca flor'  
ŝi havis ĝojon, mi divenis nun;  
aŭ por demando tima: „Ho Orfe'?”  
kaj sciis mi ke ŝajnas la vojaĝ'  
al ŝi tre longa. Per streĉita kol'  
mi ĉiam iris tra malmola land',  
kun sang' sur pland', soifo en la  
[buŝ'.  
Mi pensis: „longa la vojaĝo! Ĉu  
ŝi ankaŭ havas sangon sur la  
[pland',  
soifon en la buŝ'?” Sed iris mi  
kaj ne post mi rigardas en konsci'  
ke eksopiris ŝi. Mi en la brust'

eksentis baton, ŝian baton, ho mi ofte aŭdis ĝin el ŝia kor'. Ekdiris mian nomon ŝi ne plu, nur ĉiam sekvis min kun dolĉa paŝ', mallonge foje haltis dum sopir', daŭrigis ree, sopirante pli profunde...

Subite ŝia kri' konsternis min. „Orfeo ve!” eksonis ŝia ĝem', „Orfe'! Orfeo!” kaj mi haltis tuj. Mi sentis ŝin paliĝi. Ĉe la kol' al ŝi streĉiĝis flanke nun tenden' duobla. Mi silentis kaj sen mov' en l'estontecon vidis mi sen vort'. Sed ve! aŭdiĝis ree ŝia kri' nun petegante: „Vidu ho Orfe', ho vidu, jen serpenton, ree al kalkano mia. Ho Orfeo la serpento de Aristajoso.” Ve amikoj miaj, tiam estis mi turnanta min. Ŝiriĝis mia kor' pro ŝia voĉ' ŝiriĝis la esper'. Postrigardante flugis for nebul' de mi. „Ho Eŭrudiko, Eŭrudik'!” petegis ĵure mi al la fantom' iĝanta for; sed vane. Kuris mi post ŝi; kuregis mi per la potenc' de l' forta vent' en ŝvela la vual'

de mia vest': sed vane... Eŭrudik' ŝi estis, ja ŝi estis, Eŭrudik', amikoj miaj, ve perdita...

Ho vi, sciiĝinta pri ĉi tiu vort', vi kiu ripozigas ĝin sur fund' de via koro, kie ĝermas sem' iĝanta flor' de via penso. Ne ĉi tion vi deŝiras, sed ĝis frukt' kreskadi lasas, konservante ĝin kaj ĝian kernon plantas por multig' en la ĝarden' de via vivo. Vi, amikoj, kiuj aŭdiŝ tion kaj interne aŭdas kiel resonad' martela de la vorto mia, pri la rompebleco de la terfeliĉ' memoru kaj ne rompu por dezir' momenta la feliĉon de la tag' sinsekva, ĉar ĉe ĉiu revekiĝ' relikvo ili estas, kiu ja ueniam estas ekfermata; se vi scias ke vin sekvas la feliĉ', ho kovru l'ekrigardon per la vest' kaj fermu la orelojn kaj se ĝi petegas vin turniĝi, se al vi demandas helpon kaj postulas ĝi atenton vian, pensu al feliĉ', amikoj miaj, kiun perdis mi.

Tradukis Hector VERMUYTEN.

(Premiita en la XIV aj. Internaciaj Floraj Ludoj.)

---

## LA FLANDROJ ĈE LA INTERNACIA BLINDULKONGRESO EN VIENO.

Ni jam sciigis en nia antaŭlasta numero, ke nia samideano Frans Fiten, gvidanto de la *Algemeen Blindenverbond van Vlaanderen*, estis elektita kiel vicprezidanto dum la Internacia Blindulkongreso en Vieno.

Flandra deligitito deklaris en sia salutparolado, ke — kvankam la flandra deligitaro estis menciita sur la kongreslisto sub la rubriko „Belgujo” — oni ne devis pensi, ke la Flandroj estis „Belgoj.” Li



atentigis pri la fakto, ke ni nur apartenas geografie al la Belga ŝtato, sed ke nia koro ne por Belgujo, sed por Flandrujo batas.

Ankaŭ prilingva incidento okazis dum tiu kongreso. La blinda gvidanto de la rusa deligitaro parolis ja rusan, kion lia propra tradukanto tuj tradukis germane. La Itala deligitaro protestis, memorigante, ke estis nur kvar permesitaj kongreslingvoj, nome germana, franca, angla kaj itala. La rusa deligitaro pruvis kiel partieme estis, permesi la italan, parolata de 60 milionoj kaj ne la rusan, parolata de 146 milionoj da homoj.

Alia incidento okazis la duan tagon, kiam la Itala deligitaro proponis doni 1 voĉon al ĉiu nacio; en la germana traduko oni nomis tion „*eine Stimme pro Staat*.” Flandra deligito demandis ĉu la intenco estis 1 voĉo al oficiale rekonita ŝtato aŭ al ĉiu popolo. Por Belgujo oni devis speciale tion klarigi, ĉar loĝas en tiu lando du diversaj popoloj: Flandroj kaj Valonoj. La itala propono akiris post longa diskutado la plimulton, sed ĉar ne ĉeestis belga deligitaro, la blinda gvidanto de la flandra deligitaro, Frans Fiten, akiris voĉrajton.

Kiam la prezidanto dum la lasta tago proponis meti la Blindulkongreson de 1931 sub la patroneco de la Ligo de Nacioj, la flandra deligitaro kontraŭbatalis tiun proponon, ĉar ĝi ne fidus la Ligon de Nacioj. Kial? Tial ke,

1e) en 1925 la Ligo de Nacioj akceptigis de ĉiuj aliĝintaj landoj leĝon laŭ kiu la almozpetado estas malpermesata al blinduloj. Ankaŭ en Belgujo oni akceptis en 1925 tiun leĝon kaj tamen la almozpetado de blinduloj tie estas ankoraŭ nun pli faciligita ol malebligita de la regnestraro; la intervencio de la Ligo de Nacioj tute ne estis efika;

2e) Post la milito la Belga Nacionala Komitato por Nutrado postlasis gajnon de 9 milionoj da frankoj. La Amerikanoj decidis doni tiun gajnon al la milit- kaj aliaj blinduloj el Belgujo kaj Nord-Francujo. La komitato, kiu devas administri tiun monon, staras sub la gardo de Belgujo kaj Francujo, membroj de la Ligo de Nacioj, kaj nomiĝas „*American Braille Press for War and Civilian Blind Inc.*” Depost 10 jaroj la Flandroj petas subtenon por Flandra blindulpresejo sed ne povas akiri unu centimon da oficiala subteno; dume niaj blinduloj ne povas legi iun flandran libron, dum en Valoujo kaj Francujo ekzistas kvindeko da blindulpresejoj.

La Amerikano Raverat, administranto de suprenomita fondiĝo, komitatano de la Blindulkongreso, forlasis la estrarlokon, iris babili malantaŭe en la salono kun aliaj sinjoroj, sed ne respondis je la demando, kio okazis per la naŭ milionoj.

La flandra deligitaro ankaŭ demandis al S<sup>ro</sup> D<sup>ro</sup> Strehl el Marburg-Germantujo, prezidanto de la Kongreso, kial li mem en Genève en 1927 estis kontraŭ apogo ĉe la Ligo de Nacioj kaj nun aliopiniis. Li respondis,

ke multe ŝanĝis de post 1927, sed je l' demando: kio do? li ne trovis respondon.

Dum la blindulkongreso en Vieno, la flandra deligitaro atentigis 23 naciojn pri la subpremado de l' flandraj blinduloj en Belgujo.

Nia samideano, Frans Fiten, elektita kiel vicprezidanto en du gravaj internaciaj komitatoj, nome por Blindula Laborantaŭzorgo kaj Internacia Kuniĝo (Internationaler Zusammenschluss) celis precipe homan traktadon de la blindaj laboristoj. Specialistoj, kuracistoj kaj profesoroj, li opinias, devas esti por helpi la blindulojn, sed la blinduloj mem devas estri la Internacian Blindularon.

---

## Flandra Kanto Esperantigita.

### LA TREMVOSTULO.

Teksto de *Lambrecht Lambrechts*

Muziko de *Emiel Hullebroeck*

Ekkantis tremvostul' sur dom':

— „Kantrinjo, ĝojas mia kor'!

„Kivik!"

„Kivik!"

Eliru, hom'! Eliru, hom'!

— Ludoĉjo, for nun la dolor'!

„Kivik!"

„Kivik!"

Vosteton sian movis ĝi

— „Nun baldaŭ maja la monat'

Kaj ĝoje sonis ĝia kri':

„Nin ambaŭ logos al amad'.

„Kivik! Kivik! Kivik!"

„Kivik! Kivik! Kivik!"

Ce la fenestro jen Katrin':

— „Kaj logos Maj' alia nin,

„Kivik!"

„Kivik!"

Ludoĉjo alparolis ŝin:

„Ni estos edzo kaj edzin',

„Kivik!"

„Kivik!"

„La vintro iris el la land':

„Anstataŭ du ni estos tri:

„Aŭdiĝas tremvostula kant'."

„Tremvostulet' siblos kun ni!

„Kivik! Kivik! Kivik!"

„Kivik! Kivik! Kivik!"

*Tradukis Martha Vervloet.*

---

## NEKROLOGIO.

— Nia juna samideano Jozef Minnaert, malnova membro de „Flandrema Grupo Esperantista," subite mortis, viktimo de vojakcidento. Al lia familio ni prezentas niajn plej sincerajn kondolencojn.

---



## SUB LA LIBERA ĈIELO

Karaj geamikoj, kiuj ankaŭ ĉeestis la esperantan libertempsemajnon en Oostduinkerke, kiam mi estos centjara (sed tiel longe mi certe ne vivos) tiam mi ne jam estos forgesinta la belegajn tagojn kiujn mi pasigis inter vi sub la libera ĉielo!

Mi eĉ ne dormus sur „pluma matrac’,, tiel bone kiel sur la pajlo tere en nia tendo! La manĝaĵoj ne povas esti tiel bonaj en „Luilekkerland,, (Revita lando de l’ mallaboremuloj) kiel tiuj, kiujn ni mem faris!

La suno brulegis, sed la maro refreŝigis nin, la vasta, grandioza maro. Kaj nokte, antaŭ „enpajliĝi,, ni kuŝis ankoraŭ dum kelka tempo tere ekster niaj tendoj, rigardis la ĉielon, la multnombrajn stelojn, kaj ne multe parolis, sed sentis, ke nin kunigis la saman admiron por la naturo, el kiu Dio tiel klare parolis al ni.

Jes, mi iĝas revema kiam mi repensas pri Oostduinkerke. Mi revidas pense nian bonan amikon Moy Thomas, Pomon, la ĉarman fraŭlinon, kiu tiel bele kantis dum nia festo en la dunoj, mi revidas ĉiujn, ĉion.

Tiu festo en la dunoj, vespere ĉe la lumo de la luno kaj de kelkaj balonlanternoj apud nia flago, kiu tiel fiere flirtis. Ĉu festo en bela salono valoras tiom? Ĉu pli taŭgan scenejon, pli komfortajn sidlokojn vi havas en moderna teatro? Kaj la programo! Nia germana, rejnlanda „Wanderknabe” (migranta junulo) Martin Fehr, kiu krom kelkaj el siaj belaj naciaj kantoj, lernigis al ni... ĉinan kanton; nia esperantista trobadoro Thomas, ĉiam same bonhumora kaj movema kiel juna fianĉo; la deklamado de Mart; la kantado de Pomo kaj de lia akademie bela samlandanino; nia komuna kantado; kaj, *last not least*, la reiro al la hotelo tra la nokto je la lumo de la lampoj! Neforgeseble estas!

Ankaŭ la festojn, organizitajn de niaj britaj geamikoj en la Granda Hotelo, ni ne rapide forgesos, same kiel... la bonan supon de nia amiko Benoit.

Se mi devus skribi ĉiujn miajn impresojn pri la libertempsemajno en Oostduinkerke, mi bezonus tutan numeron de *Flandra Esperantisto!* Sed kiu volas scii pri tio iom pli, informu ĉe kiu ajn kiu kuniris!

Kiam oni demandis, kiu denove kuniros la sekvontan jaron, ĉiuj ĥore ekkriis: „Mi!,,

JAN.

---

## Francemaj U. E. A. deligitoj en Flandrujo.

La flandran urbon *Brugge* vi ne povas trovi en la jarlibro de U. E. A. Estas „*Bruges*” (Flandre occidentale)! La deligitino estas <sup>1<sup>tho</sup></sup> Yvonne Thooris, 4, rue de l’Outre; la sama, kiu estis kulpa je la



incidentoj dum la nacia kongreso en Brugge. Estas ŝi, kiu tiam konsilis al la skabeno de publika instruado akcepti la esperantistojn, el kiuj la plimulto estis flandroj, per franca parolado. Ke <sup>1<sup>mo</sup></sup> Thooris hontas pri sia gepatra lingvo, estas ŝia afero, sed ŝi devus esti estinta almenaŭ *deca* je tiuj Flandroj kiuj fieras pri sia deveno!

Ankaŭ *Tienen* estas netrovebla en la sama jarlibro! Estas „*Tirlemont!*“, Tamen <sup>s<sup>ro</sup></sup> Rodecyns, la deligito, kiel polica oficiro verŝajne scias la flandran. Sed eble por lia rango ĉi tiu lingvo estas tro popolaĉa, *Brugge* kaj *Tienen* estas flandraj urboj; devas do tiamaniere troviĝi en esperantista jarlibro!

U. E. A.-anoj, postulu ke viaj deligitoj, kiel veraj esperantistoj, respektu la naciajn lingvojn!

---

## Al la Flandra Socia Memregeco!

Estas ĝojiga fakto ke la Flandroj, atendante la realiĝon de sia politika memstareco, jam de nun mem prizorgas ke ilia tuta publiksocia agemo kiel memstara popolo, grade eltordiĝu el la Belga kadro. Dum ili interese rigardas la politikajn progresojn, kiujn la Flandra Movado, plie kaj plie enlibrigi povas, ili senprokraste konstruas propran socian hejmon.

Ni nomu kelkajn tipajn ekzemplojn: la Flandra Turisma Ligo estis fondita ĉar la loko de la Flandroj ne estis en la vicoj de Belga Turismo-Klubo. Eĉ ne menciante la maldelikatajn, malbonojn traktaĵojn de la Flandra lingvo en tiuj ĉi rondoj (sufiĉaj tamen kialoj por ne al ĝi aniĝi!) neniu Flandro iam devus aliĝi al tiu organismo, ĉar principe li bezonas propranaturan ligon por kontentigi siajn turismajn bezonojn. Tion ja ordonas ĉiu nacia memrespekto. Ke tiu ĉi instituto estis trecege postulita, tion pravas la fakto ke la Flandra Turismo-Ligo, fondita de post la mondmilito, nuntempe jam pli ol 80.000 anojn posedas kaj duonmonatan, belege ilustritan revuon eldoni povas.

Ankaŭ la Flandra Ekonomia Ligo estis vere necesega. Kvankam ni scias, ke tiu ĉi instituto, ankoraŭ enhavas multe da neperfektaĵoj kaj malfortaĵoj, ni ne pli longe povis toleri, ke la Flandra ekonomia fruktdonemo utiliĝu, preskaŭ tute al fremdaj institutoj aŭ ŝtatoj, kiuj poste nin kontraŭbatalas pere de niaj propraj el la manoj tiritaj armiloj.

Ankaŭ la Flandra Kruco estas instituto, kiu devis realiĝi por kontraŭstari la Belgan Ruĝan Krucon kun ĝiaj malefektivaĵoj kaj mallertaĵoj. Kiu el ni ne memoras, ke dum la estinta jaro, kiam okazis la digrompiĝegoj en la regiono de Dendermonde, la Brusela Centra Estraro

de la Belga Kruco sendis fraŭlinojn, kiuj nur la Francan lingvon scipovis kaj ne povis paroli kun la Flandraj ruinigitoj. Ĉu tia bonfarado(?) estas ankoraŭ socia laborado aŭ ĉu ĝi estas nura fiera montrado de neuzbla sentemaĉo?

La lasta kaj por ni, Esperantistoj, plej grava okazintaĵo, estas ja la fondo de propra esperantista organo. Ni bedaŭrinde tro bone scias kiel ni, ankaŭ en tiu ĉi sfero estas elpuŝitaj. Oni jam rajte plendis ĉen ĉi tiu organo pri la ekskluzive Franclingvaj paroladoj dum la Belga Esperanto-Kongreso en Gento, sed oni menciis forgesis ke preskaŭ la samo okazis dum la Katolika Esperanto-Tago. Kvankam en la propagandcirkuleroj la kongresestraro promesis ke la paroladoj kaj prelegoj okazus flandralingve por la Flandroj — kaj tion kredis kaj fidis multe da ne la francan scipovantaj Flandraj neesperantistoj, — tamen fakte la plimulto el la prelegoj fariĝis sole franclingve, ĉar (kiel diris la prezidantino de Belga Kat. Jun. Asoc.) ĉeestis unu aŭ du Valonoj, kiuj nesciis la Flandran lingvon... Tion oni honteme nomas „cedemo por la Valonoj.” Ne, tute ne, tio estas nur manko de nacia memrespekto! La fakto, ke ni nuntempe posedas propran organismon eligos el la mondo tiun ĉi misstaton. Sed tio ne sufiĉas! Ni devas klopodi por akiri propran flandran esperantistan instituton. Cetere, ni jam de nun povas zorgi, ke la tutmondo estu informata pri la premegado de nia popolo kaj pri la progresado de nia kara Flandra Movado, spite la „Belga”-sciigoj, kies monopolo tiamaniere finiĝos.

*Lango vane ŝnurita.*

---

## FLANDRA RAKONTO.

### PRI LA FRAŬLINO, KIU PREĜIS AL LA SANKTA VIRGULINO POR AKIRI EDZON

Estis iam maljuna fraŭlino, kiu deziregis edziniĝi kaj ĉiutage ŝi iris preĝi antaŭ la altaro de la Sankta Virgulino. Ŝi ĉiam finis per la preĝo: „Ho, Mario, havigu al mi edzon! Ho, Mario, havigu al mi edzon!”

Jam multfoje la pedelo estis aŭdinta tion kaj iun vesperon li kaŝis sin malantaŭ kolono. Kiam la fraŭlino denove preĝis: „Ho, Mario, havigu al mi edzon!” li respondiĝ per dolĉeta voĉo: „Filiĉeto, vi ne plu akiros iun.”

Kaj la fraŭlino, pensante ke estis Jezucto kiu parolis, diris malbonhumore: „Vi senmalica infano, ne ŝovu vian nazon en ĉi tion! Lasu paroli vian patrinon!”

Rerakontis JAN VAN SCHOOR.



# MAJSTRO.



*L. H. Zamenhof*

“Majstro, ni ĉiuj honoras vin,  
Amo Via fortigas nin,  
Verkon kreitan kun multa dolor’  
Ĉiam ni havas en la kor’!”

Majstro respondas: “Ne volas mi  
Laŭdon, gloron, eĉ ne de vi,  
Se vi min amas, min sekvu kun ĝoj’  
Sur tiu sama kruta voj’!”

*Catharina J. Roskes-Dirksen.*

---

*La supre presita bildo de la Majstro estas havebla sur poŝtkarto kaj havebla ĉe la eldonintoj R. Dekegel kaj P. P. Collin, Denderstr., 58, Aalst (Belgujo). Prezo: 1 belgo po 10 ekzempleroj.*

## ĜI RIDIS.

DE ALBRECHT RODENBACH

Ĝi ridis ĉue la aŭskultantar'  
ĉar mi pri Flandrujo parolis.  
Ĝi diris: Pri io alia ajn  
neniam vi konversacias.  
Nu, jes! jes! Flandrujo estas nur  
de miaj klopodoj la celo;  
la vivo por ĝi kaj Flandrujo por Di',  
ho mortus mi tion gajnante!

Tradukis JAN VAN SCHOOR.

## DIVERSAĴOJ.

— Ni ekscias el la gazetoj, ke ĉe la eldonejo Thieme kaj Ko. aperis esperanta traduko de la konata verko de Conscience *La Leono de Flandrujo*. La traduko, kiu estas de la mano de nia nederlanda samideano H. J. Bulthuis, certe estas bonega. Tion ni jam kuraĝas diri, kvankam ni ne jam vidis la libron, sed la nomo de Bulthuis estas garantio. La prezon ni ankaŭ ne jam scias; tamen ni jam konsilas al niaj aĉetemaj legantoj (ĉiu flandra esperantisto devus posedi tiun libron!) ke ili mendu la libron pere de „Flandra Esperanto Instituto.”

— Ni ankaŭ ekscias el la gazetoj, ke s<sup>ro</sup> Bulthuis oferos luksan ekzempleron de *La Leono de Flandrujo* al la reĝo de Belgujo. Bone! Lia reĝa moŝto verŝajne promesos, ke li lernos esperanton, — promesos, ke li iĝos ano de la „Belga Ligo,” — promesos, ke li ĉiam portos la verdan stelon, — promesos, promesos... Sed la Flandroj jam scias kiom valoras la promesoj de lia reĝa moŝto.

— Tiuj kiuj interesiĝas pri la kantoj *Kantalunoj* kaj *Vundita estas mia kor'*, tekstoj de Jan Van Schoor, skribu al la komponisto s<sup>ro</sup> Antoni Valls-Roviralta, pianista-compositor, Ripollet-Barcelona.

— La Akademio de la Lingva Komitato oficialigis la prefikson „mis.” Ĝia signifo estas severe limigata al la senco: erar-, malĝust-, malbon-. De nun ĝi estas oficiala laŭ la nomita senco.

— En *Sennaciulo* aperis artikolo de Léon Bergiers pri „La Flandra Movado,” plena je malpravaĵoj kaj mensogoj. Faŝisto estus tute same verkinta tiun artikolon. *Les extrêmes se touchent!*

## SUBTENO POR NIA REVUO.

Gust van 't Boske, 20 fr.; H. V., 10 fr.; Kunveno 11/9, 10 fr.; John Théry, ĉiumonate, 10 fr.; Jan, ĉiumonate, 10 fr.; Mart, ĉiumonate, 10 fr. W. C., 10 fr.; Ger. de B., 10 fr.; *entute: 90 fr.*



## GRATULOJ.

— Al Clementina Van de Moortel kaj Antoon Verstraeten, membroj de „Flandrema Grupo Esperantista,” kiuj geedziĝis la 24 an. de Septembro. Al la juna, simpatiinda paro ni tutkore deziras multan feliĉon!

## BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas. Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto.”)

### RICEVITAJ REVUOJ

Marto, numeroj 8-9; International Language, numero 6; The British Esperantist, numero 293; Barcelona Stelo, numero 10; Breiz Atao, numeroj 63, 64, 65; Utrechta Esperantisto, numero 8 (53); Antaŭen, Aŭgusto; Sennaciulo, numeroj 256, 257; Holanda Esperantisto, numero 90; La Dordrechta Esperantisto, numero 8; Internacia Medicina Revuo, numero 5; Espero Katolika, numero 64.

## INTER NI.

*El Sankta Nikolao.* — La 1 an. de Septembro multnombraj geamikoj el Hoboken (Hobokenaj Esperantistoj — A. P. P. K.) kaj Aalst (Pioniroj — B. L. E.) denove kunvenis por tuttaga restado en Sankta Nikolao. La tutan urbon oni vizitis kaj i.a. la tombejon de la kamparanaj mortinoj dum la Boerenkrijg (Kamparana Milito). Iĝe la vizitantoj bedaŭris la malzorgan staton de ties tombejo. Ĉu ĝi ne interesas la urbestraron aŭ la Flandremajn Partiojn?

La 11 an. de Oktobro komencos nova kurso, gvidata de s<sup>ro</sup> Schiffer.

*Al Triumfo* (B. L. E.) transloĝiĝis de kafejo „Rome” al „Rubenspaleis,” Ankerstraat, kaj estonte kunvenos vendrede anstataŭ merkrede. Post propono de sinjoroj Beirens kaj Van Ghend, la estraro decidis ne plu havigi „Belga(n) Esperantisto(n)” al la gemembroj kaj lasi al ili la plej grandan elektliberon aboni ĉu „Flandra(n) Esperantisto(n),” ĉu „Katolika(n) Espero(n),” ĉu alian gazeton. La flandremaj esperantistoj petas la geamikojn el aliaj grupoj enkonduki saman decidon.

*El Aalst.* — Ankaŭ la „Pioniroj” tute malaprobas la agadon de la eminentuloj de la Belga Ligo kaj pacience esperas respondon al la multaj leteroj senditaj al tiu liga estraro.

La 13 an. de Oktobro la „Pioniroj” festos la duan datrevenon de la unua Esperanto kurso en Aalst kaj tutkore invitas la geamikojn al la tuttagaj festoj. Por informoj oni sin turnu al s<sup>ro</sup> De Kegel, Denderstraat, 58, Aalst (telefono 239).

*El Antverpeno.* — *La Rekta Vojo.* — Sabaton la 19 an. de Oktobro okazos la malferma balo, organizita de tiu neŭtrala grupo esperantista, en la salonoj de la „Grand Café des Billiards,” kun la kunlaborado de „The Majestic Orchestra.” Okazos surprizoj kaj Rekta Vojo-valso. La enirprezo estas tri frankoj.

*Flandrema Grupo Esperantista.* — La kursoj, gvidataj de sinjoroj Vermuyten kaj Van Schoor, finiĝis. Honore de la sukcesintoj en la ekzameno la grupo organizis intiman koncerton la 28 an. de Septembro en la salono „Uilenspiegel,” Diepestraat. Ĉar la revuo estis jam kompostita antaŭ tiu dato, mi raportos pri tiu festo en la sekvonta numero.

Kelkaj el niaj membroj ĉeestis la IV an. Nederlandan Kongreson de Esperanto, okazinta en Arnhem la 21 an. kaj 22 an. de Septembro. Pro la sama kaŭzo raporto pri tiu kongreso aperos poste.

Baldaŭ novaj kursoj, gvidotaj de sinjoroj Van Schoor kaj Dewijze komenciĝos.

La somero, tempo de ekskursoj kaj vojaĝoj estas for; la vintro staras antaŭ la pordo: multe da laboro atendas nin.

*Alvoko el Aalst.* — La Esperantisto Grupo “PIONIRO” el AALST aranĝas Dimanĉon 13an de oktobro, tuttagan feston al kiu estas invitataj la diversaj grupoj el la lando.

La programo estas jena;

Matene: Vizito de la urbo.

Tagmeze: Komuna tagmanĝo.

Vespere: Ludado de la teatraĵo: “Angla lingvo sen profesoro” per la geanoj de la Brusela Grupo Esperantista. Poste sekvos dancado.

Meze de oktobro komencos nova kurso.

MART.

---

## Esperanto door Zelfonderricht.

### 3<sup>e</sup> LES

#### VERTALINGEN DER TWEEDE LES

*Traduko.* — Malbonaj homoj ne kantas. Homo ne vivas de pano nur. Dio estas bona. Kio estas vivo sen amo? Ĉu vi iras al la eksterlando? Jes, mi esperas reveni baldaŭ! Viaj okuloj estas bluaj; la miaj estas grizaj. Tiel longe la bopatrino vivas la hejma paco estas for! Ĉu tio



estas vera? Jes, sed ne ĉiam! La cignokanto de la poeto. Estas nur unu lando, kiu povas esti mia lando. Oni amas nur unufoje dum la vivo. La politiko ne estas preciza scienco. Amiko estas unu animo en du korpoj. Kie estas via patrujo? Kie Mozo kaj Skeldo fluas, la Norda maro bruas kaj ŝtormas. Kaj ĉiam mia koro demandas: kie? Adiaŭ! Esperu kaj fidu je Dio.

*Vertaling.* — Ziehier papier en een potlood. De hond loopt in den tuin. Het veulen staat in den stal. Mijne schoonzuster is in de eetkamer. Hebt gij dorst? Mevrouwen en Mijnheeren, ik sprak u over de esperanto-beweging. De zuster van mijne moeder is mijne tante en de zuster van mijne echtgenoot is mijne schoonzuster. Aan wie behoort dat boek? Het behoort aan mij, Mijnheer. Hebt gij *De Leeuw van Vlaanderen* al in esperanto gelezen? De vertaling is zeer goed. Waart gij in Diksmuide? Neen, ik kon niet gaan. Kunt gij reeds uit ons tijdschrift lezen? Het is niet moeilijk! Gij verstaat 't zeker, is 't niet?

**PERSOONLIJKE VOORNAAMWOORDEN.** — Deze zijn: mi - ik, vi - gij, li - hij, ŝi - zij, ĝi - het, ni - wij, vi - gij, ili - zij (voor de drie geslachten).

Het wederkeerig voornaamwoord *zich* wordt vertaald door *si*.

**BEZITSWOORDEN** worden gevormd door bijvoeging van den uitgang „a” van het bijvoeglijk naamwoord bij het persoonlijk voornaamwoord: mia - mijn, via - uw, lia - zijn, ŝia - haar, ĝia - zijn, nia - ons, via - uw, ilia - hun, sia - zijn, haar, zijn, hun.

Het bezitswoord *sia* wordt gebruikt vóór het naamwoord waarvan de bezitting aan het onderwerp toebehoort. Hij bemint zijne moeder: li amas sian patrinon.

De **ONVOLMAAKT TOEKOMENDE TIJD** wordt gevormd door den uitgang *os*.

De **VOORWAARDELIJKE WIJZE** wordt gevormd door den uitgang *us*.

De **GEBIEDENDE** en **BIJVOEGLIJKE WIJZE** worden gevormd door den uitgang *u*.

**HET VOORWERP STAAT IN DEN ACCUSATIEF**, om het te kunnen onderscheiden van het onderwerp. Hij wordt gevormd door bijvoeging eener *n* aan den nominatief. Mi legas libron. Mi ŝatas honestajn homojn.

**VERKLEINWOORDEN** worden gevormd door het achtervoegsel *el*. Rivero - rivier, rivereto - beek; flugi - vliegen, flugeti - fladderen; ridi - lachen, rideti - glimlachen.

**VERGROOTWOORDEN** worden gevormd door het achtervoegsel *eg*. Riverego - stroom, ridegi - schaterlachen, pluvo - regen, pluvego - stortregen.

*Vertaal.* — Ik geloof in (*je*) God. Gij bleeft lang weg, mijn vriend. Waar hij is, is steeds plezier. Zij denkt, dat zij schoon is. Wij wijken nooit! Gij zult uw vaderland en zijne taal en zijnen roem beminnen. Zij hebben ooren en zij hooren niet. Mijn moeder was een heilige vrouw. Mijn zigt ge, mijn! Bemin uwe ouders. Niemand is tevreden met (*pri*) zijn lot. Hare haren zijn goudblond. De leeuw is de koning der woestijn; wij hoorden zijn gebrul in de verte. Geef ons ons dagelijksch brood. Dooden, van uit uwe graven roept gij ons toe. Zij willen hun recht. Ik kuste haar mondje. Mijn zusterken is een lief meisje. Hij stak zijn hoofd in den muil van den leeuw. Dat is prachtig! Zij glimlachte om (*pro*) zijn dwazen praat. Hij schaterlachte van (*de*) vreugd.

**WOORDENLIJST.** — Gelooven - kredi; wegblijven - forresti; lang - longtempe; steeds - ĉiam; plezier - plezuro; denken - pensi; dat - ke; wijken - malantaŭeniri; nooit - neniam; roem - gloro; oor - orelo; hooren - aŭdi; heilig - sankta; niemand - neniu; lot - sorto; goud - oro; blond - blonda; koning - reĝo; woestijn - dezerto; gebrul - muĝadon; verte - malproksimo; dagelijksch - ĉiutaga; brood - pano; doode - mortinto; graf - tombo; roepen - krii; willen - voli; recht - rajto; kussen - kisi; lief - ĉarma; steken - meti; hoofd - kapo; dwaas - stulta; praat - babilado; vreugd - ĝojo.

*Traduku.* — Mia fratino estas malsana. La domo de lia amiko staras en la kamparo. Kie estas la infanoj? Ili estas en la ĝardeno. Kie estas la seĝo? Antaŭ la fenestro. Malantaŭ la domo estas ĝardeno. Ĉu viaj amikoj venos? Mia avo estas maljuna; mia avineto ankaŭ. Frederiko perdis sian koron dum la lasta balo. Fraŭlino estas for kun lia koro. Ĉu vi estis hieraŭ hejme? Kie estas niaj ĉapeloj? Jen la via. La pomo estas via, la piro estas mia, la ĉerizoj estas de mia kuzineto. Lia frato havas pajlan ĉapelon. Neĝis; la stratoj estis blankaj de la neĝo. Espero panon ne donas. Mi instruas Esperanton al mia infano. Si petegis de Dio la morton. Homo lernas dum sia tuta vivo. La mono la mondon regas. Oni ne scias, kiu el ni morgaŭ mortos. Kiam en Parizo pluvos, pluvetas en Bruselo. Unu hirundo ne faras printempon.

**WOORDENLIJST.** — Sana - gezond; kamparo - buiten; kie - waar; ĝardeno - hof; seĝo - stoel; antaŭ - vóór; fenestro - venster; ankaŭ - eveneens; perdi - verliezen; koro - hart; balo - bal; fraŭlino - juffrouw; hieraŭ - gisteren; ĉapelo - hoed; jen - ziehier; pomo - appel; piro - peer; ĉerizo - kers; pajlo - stroo; neĝi - sneeuwen; blanka - wit; espero - hoop; instrui - onderwijzen; peti - verzoeken; morto - dood; mono - geld; mondo - wereld; regi - regeeren; oni - men; scii - weten; kiam - wanneer; unu - één; hirundo - zwaluw; printempo - lente.



## FAŝISTA MILITEMO.

La francaj kaj belgaj gazetoj ĉiam kantas je ĉiuj tonoj la laŭdon de Musolini kaj liaj nigraĉemizuloj. Sed jen kanteto, kiun publikigis la organo de la ekzilintaj Italoj en Parizo "Italia", kaj kiun oni kantigas la faŝistan junularon:

"Contro Parigi noi marceremo  
E vittoriosi ritorneremo  
Al nostro Duce riporteremo  
Come trofeo della battaglia  
La mozza testa della Marianna."

Tio estas:

"Kontraŭ Parizo ni ekmarŝos  
Kaj triumfinte revenos  
Al nia Duco ni alportos  
Kiel trofeon de l' batalo  
La detranĉitan kapon de Mariano."

Estas eble, ke la faŝismo faris ion bonan en Italujo, sed saĝaj homoj bridos sian admiron je tia militema ekkrio.

---

---

## Tutmondaj Esperantistoj!

NI PETAS VIN AFABLE SENDI AL NI ĈIUN  
ARTIKOLON TEMANTAN PRI LA FLANDRA MOVADO,  
APERANTAN EN VIAJ NACILINGVAJ GAZETOJ.

KUN ANTAUDANKO.

*La redakcio de "Flandra Esperantisto".*

---

---

## Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Poŝtĉekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !  
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

**Algemeen Blindenverbond**  
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West

Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.

Postcheck 1 5.224.

Helpt daadwerkelijk de  
Vlaamsche blinden.

Ĉiu poeziema esperantisto devas  
posedi la belegan poemaron

### AMO KAJ POEZIO

de Jan van Schoor

La prezo estas nur 2 *belgoj* (send-  
kostoj enkalkulitaj).

De la libro, pri kiu oni en diversaj  
esperantaj revuoj parolis kun grandega  
laŭdo, estas nur kelkaj ekzempleroj  
ankoraŭ haveblaj.

Do rapidu kaj menu ĝin ĉe „*Flandra Esperantisto*” aŭ ĉe „*Flandra Esperanto-Instituto*”.

*La 15an. de Oktobro aperos*

### Kantaro Esperantista

La kantaro enhavas pli ol 100 kan-  
tojn, kolektitaj de **Juul Karnas** kaj  
ĝin devas posedi ĉiu kantema sami-  
deano !

Ĉiu grupo aĉetigu la kantlibron de  
siaj membroj por agrabligi la kunve-  
nojn.

La prezo estas 5 *frankoj*, por tiuj  
kiuj mendos la kantaroon antaŭ la 15a.  
de Oktobro.

*Eldono de „LA NOVA BIBLIOTEKO”*

ĉe **H. Van der Mast**,

Vlagstraat, 9, Antwerpen.

(Poŝtĉeko 209852).

## Algemeen Vlaamsch Huis

„MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken

o. m. Dortmunder, Spalterbräu,

Leeuwenbier.

Goed koud buffet

Goede bediening.

Kunvenejo de l'Esperantistoj.

## HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

### De Ley & Verschuieren

CITÉ

N<sup>rs</sup> 143-144-145-146-147-179-180-

208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen

Zijde, Fluweel en Voeding.